

Kalendaro

Activiteitenkalender najaar 2005

OKTOBRO
 vendredo la 7a **Antverpeno** raporto de grupa vojaĝo al Vilnius (1)
 08/10 ĝis 09/10 **Loveno** Rapidkurso de Esperanto
 merkredo la 12a **Loveno** prelego pri Paleontologio
 merkredo la 12a **Gento** librovespero
 vendredo la 14a **Antverpeno** raporto de grupa vojaĝo al Vilnius (2)
 vendredo la 21a **Antverpeno** kantado

21/10 ĝis 23/10 **Zutendaal (BE)**
 PostSomera Klaĉkunveno

vendredo la 28a **Antverpeno** Andreo Cseh
 vendredo la 28a **Gento** spertoj de internaciaj renkontiĝoj
 29/10 ĝis 31/10 **Antverpeno** pedagogia seminario

NOVEMBRO
 sabato la 5a **Bruĝo** lumbildoj pri Rumanio
 06/11 ĝis 07/11 **Morbecque (FR)** Eŭropa Esperanto-Rendevuo
 11/11 ĝis 13/11 **Vlaardingen (NL)** Studsemajnfino
 sabato la 26a **Rotterdamo** malferma tago de UEA

DECEMBRO
 sabato la 10a **Bruĝo** prezento de la Esperanto-junularo
 sabato la 17a **Bruselo** Zamenhoffesto kun JOMO
 27/12 ĝis 03/01 **Niedenstein (DE)** Internacia Festivalo
 27/12 ĝis 03/01 **Xanten (DE)** Internacia Seminario
 28/12 ĝis 08/01 **Frankfurt am Main (DE)** Novjara Renkontiĝo

Contactgegevens (telefono nummers, websites en e-mailadressen)
 kan je terugvinden op
<http://users.telenet.be/esperanto/fleja/aktivecoj.htm>

Deze kalender is een selectie! Meer info over bijeenkomsten vind je onder andere in de kalenders van het Hongaarse Eventoj <http://www.eventoj.hu/>, deze van FLEJA <http://users.telenet.be/esperanto/fleja/aktivecoj.htm> en deze van NEJ <http://www.esperanto-jongeren.nl/aktiviteiten.php>

Jongeren Esperanto Nieuws **Jen**



Tweetalige opvoeding

met Esperanto

IJK en Zakopane

raporto de pola amiko

La hispana kongreso

Heidi ĝin ĉeestis

Esperanto Desperado

la lasta koncerto dum IJK

Colofon / kolofono

Jongeren Esperanto Nieuws

(JEN) is een informatieblad voor Nederlands-sprekende jongeren die belangstelling hebben voor de internationale taal Esperanto en voor taalproblemen in de wereld. Het is een gezamenlijke uitgave van de Nederlandse (NEJ) en Vlaamse (FLEJA) Esperantjongeren.

Het drukken en verzenden van de JEN wordt verzorgd door het *Esperanto-Centrum* te Antwerpen; de braille-versie wordt verzorgd door de Chr. Bibliotheek voor blinden en slechtzienden in Ermelo.

NEJ en FLEJA zijn de Nederlandse, resp. Vlaamse afdelingen van *TEJO*, *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*.

Een individueel lidmaatschap kost 20 EUR (tot 30 jaar). Giro 2717591 tnv ĉefdelegito de UEA in Rotterdam of giro 402-5510531-55 t.n.v. Flandra Esperanto-Ligo te Antwerpen met vermelding van *Individua membro MJ-T*.

TEJO-leden ontvangen een jaarboek, de bladen TEJO-tutmonde en Kontakto, plus kortingen bij bijeenkomsten.

Naast bijdragen van medewerkers, zijn de artikels in deze JEN onder andere gebaseerd op berichten uit e-maillijsten (nejkajfleja, Esperanto en Belgio) en van websites (o.a. www.esperanto.se/NUN en www.gxangalo.com).

De uiterste datum voor het binnensturen van artikels voor JEN 167 is 10 jan. 2006.

Vlaanderen (Int. toegangscode +32)

Redactie/Redakcio:

Yves Nevelsteen, Koning Albertlaan 147, 9000 Gent. Tel. 09/3307156
yves.nevelsteen@telenet.be

Administratie en informatie / Administrado kaj informado: FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Abonnementen en lidmaatschap

- Introductieabonnement (drie nummers) gratis
- Lidmaatschap FLEJA/FEL: 20 EUR (Omvat de tijdschriften Horizontaal en Jen)
- Abonnement op JEN: 9 EUR

Argenta-rekening / Ĝirkonto:

979-6339610-83 t.a.v. de Vlaamse Esperanto Jongeren, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

FLEJA-bestuur / FLEJA-estraro:

- Yves Nevelsteen (voorzitter/prezidanto)
- Nataliya Chumak (ondervoorzitter/vic-prezidanto)
nataliya.chumak@belgacom.net
- Veerle Swartebroekx (secretaris/sekretario)
venjo@pandora.be
- Ben Indestege (penningmeester / kasisto)
ben@esperanto.be
- Anuschka De Coster (bestuurslid/estrarano)
Anuschka.DeCoster@UGent.be
- Björn Claes (bestuurslid/estrarano)
bjornclaes@belgacom.net
- Heidi Goes (bestuurslid/estrarano)
heidi_goes@yahoo.com

E-post en www / retroŝto kaj ttt:

e-post: fleja@esperanto.be
internet: <http://www.esperanto.be/jongeren>
<http://www.esperanto.be/junuloj>

Nederland (Int. toegangscode: +31)

Administratie en informatie / Administrado kaj informado: Fabien van Mook, Sophoclesstraat 121, 3076 AL Rotterdam, Tel.: +31-10-2 91 71 51
fabien@galerio.org

Abonnementen en lidmaatschap

- Introductieabonnement Jen (1/2 jaar): gratis Enkonduka abono Jen (duona jaro): senpage
- Lidmaatschap NEJ per jaar (incl. Jen): Tot 20 jaar: 11,50 EUR / Vanaf 20 jaar: 14,50 EUR
- Abonnement op JEN: 9 EUR
- Donateurs die 14,50 EUR of meer bijdragen, ontvangen ook JEN

Girorekening / Ĝirkonto:

719930 t.n.v. Nederlanda Esperanto-Junularo, Amsterdam.

NEJ-bestuur / Estraro de NEJ:

- Robert von dem Borne (voorzitter / prezidanto)
Parkstraat 7-02, 3581 PA Utrecht,
Tel.: 030-2316759, E-post: norojo@ilse.nl
- Ewout Lamé (secretaris / sekretario),
Hoge der A 24-3, 9712 AD Groningen
Tel.: 06-42507502
E-post: e.b.lame@student.rug.nl
- Marcel Geurtsen (penningmeester / kasisto)
Prinses Beatrixlaan 16, 1111 GD Diemen,
Tel.: 020-6909079
E-post: marselo_q@yahoo.com

E-post en www / retroŝto kaj ttt:

e-post: info@esperanto-jongeren.nl
internet: <http://www.esperanto-jongeren.nl>
mobiel / poŝtelefono: Tel.: 06-42507502

Provlegis Ronaldo NOBEL'

Esperanto lernu? Lernu! Esperanto gebruiken? PSKK!

lernu! is een meertalige website waarmee Internetgebruikers gratis en op een gemakkelijke manier Esperanto kunnen leren.



Surf snel naar www.lernu.net.

De website wordt gemaakt door een internationaal team van vrijwilligers. Hieronder stellen zij kort hun toekomstplannen voor.

Saluton,

mi volas prezenti al vi la parte novan kernan teamon de lernu, kaj kion ĝi faros dum la ontaj monatoj:

PSKK 2005—ben jij al ingeschreven?

De najaarsbijeekomst van FLEJA vindt dit jaar plaats in Zutendaal (Limburg). Velen hebben zich al ingeschreven. Jij nog niet? Misschien kunnen de volgende programmapunten je overtuigen:

- het bezoek aan Maastricht met rondleiding in het Esperanto
- ons 'kuireja teamo' Eddy kaj Ella
- de danscursus van Bart
- het verkleedbal
- de voordracht van Anuschka over Pasporta Servo in Australië
- het optreden van de Duitse groep Muy Adictivo

Alle info vind je op <http://www.esperanto.be/jongeren>

Hokan

Nieuwtjes vanop het UK in Vilnius

Muzikpluvo van Akordo opnieuw uitgegeven

Muzikpluvo, een cd van het Nederlandse Esperantokoor Akordo uit 1996, was al enkele jaren uitverkocht. Ter gelegenheid van het UK in Vilnius heeft Akordo deze cd echter opnieuw laten uitgeven. De cd is dus opnieuw leverbaar!

Meer info:

<http://www.tekstoij.nl/akordo/nl.htm>

<http://www.tekstoij.nl/uitgeverij.htm>

Er bestaan natuurlijk veel meer sites over Esperantomuziek. Een hele uitgebreide is deze: <http://www.musicexpress.com.br/>

Roel Haveman



Nova libro: Historio de Esperanto

KALININGRADO (Ruslando). Eldonejo 'Sezonoj' prezentis en la 90a Universala Kongreso (Vilno) novan libron de Aleksander Korĵenkov 'Historio de Esperanto'. La 128-paĝa libro estas presita en Litovio (1000 ekz-oj). Ĝi enhavas 11 ĉapitrojn: de 'La iniciatoro de Esperanto' ĝis 'Post la falo de la Berlina Muro'.

'Historio de Esperanto' estas aĉetebla kontraŭ 12 eŭroj en la libroservo de UEA kaj en aliaj movadaj libroservoj. Pliaj informoj, antaŭparolo, la 9a ĉapitro ('For la neŭtralismon!') kaj bibliografio estas legeblaj rete ĉe: <http://Esperanto.Org/Ondo/>, rubriko 'Novaĵoj'.

Raportis: Sezonoj <sezonoj@gazinter.net>

Voorwoord

Deze zomer ben ik nog eens naar een grote Esperantobijeenkomst geweest: het **IJK in Polen**. Het was wederom een onwaarschijnlijke ervaring. Voor mij was vooral de aanwezigheid van Aziaten een hele verrijking. Tussen de 455 deelnemers waren er relatief veel Belgen en Nederlanders dit jaar in Zakopane; Esperanto is absoluut iets dat jongeren met interesse voor internationale contacten blijft aanspreken.

In Frankrijk is men de laatste tijd zeer actief strips aan het uitgeven. Na "Tinĉjo en Tibeto" brengen zij nu "**Gastono Lafuŝo**" op de markt. Duitsland blijft het land bij uitstek van de bijeenkomsten. Rond oudejaar vinden er opnieuw maar liefst drie grote plaats: IS, IF en NR.

Vlaanderen is op Esperantogebied vooral bekend vanwege het Esperantocentrum met o.a. de drukkerij van Monato en de Retbutiko.

De **jongerenbijeenkomst PSKK** is in de loop der jaren toch ook een vaste waarde geworden. Bestuursleden van de Vlaamse Esperantojongeren hebben op zowat elke zomerbijeenkomst in Europa affiches opgehangen; we verwachten eind oktober tot 80 deelnemers. Schrijf je vandaag nog in!

Het deed me veel plezier om als redacteur van JEN opnieuw zoveel kopij te ontvangen. Hartelijk dank daarvoor; blijven sturen!

Yves

Inhoud Enhavo

Voorwoord	3
La IJK en Zakopane	4-5
Tweetalige opvoeding... met Esperanto	6-7
Donkiĥoto parolas Esperanton	8-10
Espero.com en papera formo	11
Nove aperis: Gastono Lufuŝo	12
Uit de pers	13
Esperanto en Moldavio	14
Lingvoinstruo en Anglio	15
Esperanto Desperado - lasta koncerto	16-17
NEJ-administratie	18
Esperanto zakwoordenboekje	19
Ĉĉĉerono en Barcelono	20-21
Nieuwtjes vanop het UK in Vilnius	22
Lernu! kaj PSKK	23
Activiteitenkalender	24

La internacia junulara kongreso en Zakopane

Mi ne pensis iĝi esperantisto ĝis la 17a de junio 2005, kiam mi renkontis je interreto bonkoran virinon kiu parolis Esperanton. Ŝi volis ke mi helpu ŝin lerni la polan lingvon, ĉar ŝi estis ironta al la IJK en Pollando la sekvontan monaton.

Ĝis tiam mi ne aŭdis multe pri Esperanto; nur mia instruisto pri lingvistiko menciis ion pri tiu-ĉi artefarita lingvo dum unu el miaj lecionoj. Rezume li diris ke ni fakte ne bezonas alian internacian lingvon ol la angla. Tamen, la kompleta ideo ŝajnis tre interesa al mi kaj mia renkonto kun Veerle donis al mi la eblecon havi pli proksiman rigardon al Esperanto.

Pli interese estas ke ŝi proponis ke mi partoprenu la Internacian Junularan Kongreson en Zakopane. Mi decidis iri tien kaj estis la plej mirinda sperto de mia vivo.

Mi pasigis mian tempon promenante tra la urbo, renkontante novajn homojn, irante al koncertoj kiuj okazis ĉiunokte, dancante en diskoteko kaj kompreneble trinkante bieron.

Mi ankaŭ havis la eblecon partopreni Esperanto-kurson por komencantoj. Tiuj kiuj volis lerni kelkajn bazajn regulojn de la pola lingvo, povis sekvi polan kurson. Dum la ekskursita tago ni iris al la monteto proksime de Zakopane,

Gubałówka, kaj ni havis la eblecon rigardi al la urbo de la pinto de la monteto. Pri la vespera koncertoj, mi ŝatis « Esperanto Desperado » plej. La plej famaj kantoj dum diskotekoj estis « La Bamba », kun speciala danco dum kiu oni povis kisi iun ajn kiun li (au ŝi) ŝatis kaj kiu estis dancanta en la rondo. Mi ankaŭ havis la oportunion renkonti kelkajn samseksemulojn por la unua fojo en mia vivo. Unu el ili eĉ volis pasigi la nokton kun mi, sed mi devas diri ke mi preferas knabinojn...

Mi surpriziĝis pri la etoso kiu regis dum la kongreso. Mi neniam vidis tiom da amindaj homoj en unu loko. Ekde kiam ni alvenis al la kongresa konstruaĵo, mi sentis kvazaŭ mi estis en komplete malsimila mondo – Esperanto-mondo. Mi komprenis ke Esperanto ne nur estas lingvo, sed pli iu forto kiu kunigas ĉiujn afablajn homojn el la tuta mondo. Ni povas senti nin egalaj, neniu nacieco humiligas alian, neniu



Ĉiĉerono en Barcelono

parolis pri ĝi, ili diris ke estas neuzata lingvo.

Do, la 13-an de julio 8 miaj geamikoj kaj mi prenis la trajnon de Figueres (150 km de Barcelono) al Barcelono. Mi interkonsentis kun Farri ke mia grupo renkontos lin ĉe la stacidomo de El Clot en Barcelono.

Sed kiam la trajno haltis tie okazis problemo. La pordoj ne sufiĉe longe restis malfermitaj kaj 6 de miaj geamikoj restis entrajne dum mi kaj du aliaj jam estis ekstere. Kiam mi renkontis Farri ekster la stacidomo mi tuj klarigis al li la problemon. En tiu momento mi tre ĝuis ke li konas la urbon kaj parolas la katalunan.

Ne longe poste ni ĉiuj renkontiĝis ĉe la elirejo de la sekva stacidomo Paseig de Gracia. Ni manĝis panon kaj renkontis amikon de Farri, Jomo, la dua gvidanto por la tago. Farri kaj Jomo gvidis nin

Laste aperis - retroŝte

Jam eblas ricevi al siaj retroŝtaj kestoj aŭtomatajn sciigojn pri la novaj varoj, aperintaj en la Katalogo de UEA. Por ekaboni la servon, bonvolu viziti la Katalogon - <http://katalogo.uea.org>, elekti menueron 'Novaj varoj' kaj entajpi vian retadreson en la formon por abonado. Oni povas agordi la abonon por ricevi ĝin en la formatoj html aŭ simpla teksto, elekti diversajn kodigojn - unikodon, x-ojn ktp.

al la plej konataj lokoj de Barcelono, la monto Montjuic, la Sagrada Familia, Parc Guëll kaj Las Ramblas. Dume ili rakontis sciindaĵojn kaj ni manĝis ĉe libana manĝejo, kie neniu normala turistoj iam manĝas.

Dum la ĉiĉerono mi devis traduki al la nederlanda por miaj geamikoj, ĉar ili ne parolas Esperanton. Mi tre ŝatis montri al ili ke apud la angla ekzistas ankaŭ alia internacia lingvo, kaj por ekkoni amikojn eksterlande Esperanto estas multe pli utila ol la angla. Mi tre ĝuis ke unu diris ke ŝi volas ankaŭ lerni Esperanton, ĉar la lingvo estas tiom facila.

Nico Huurman

Raportis: Andrej Grigorjevskij

Ĉiĉerono en Barcelono

Ĉi tiu rakonto temas pri miaj esperantaj aventuroj dum miaj ferioj en la kataluna parto de Hispanio. Mi estis tie de la 8-a ĝis la 16-a de julio.

La pasintan jaron mi estis en la sesa kaj lasta klaso de mia mezlernejo. Kiel multaj gelernantoj mi kun granda grupo planis vojaĝon al la suna suda parto de Eŭropo por festi ke ni pasis nian finekzamenon.

Antaŭ kvin monatoj mi esperantistiĝis. Ne longe poste mi ekhavis la ideon uzi Esperanton dum mia vojaĝo al Hispanio (aŭ Katalunio). En la reto mi trovis la

retadreson de la Kataluna Esperanta Asocio kaj mi skribis e-poŝton.

Tiel mi ekkonis Farri, kiu loĝas en Barcelono. Li dekomence tre ŝatis la ideon organizi ĉiĉeronadon por mi kaj miaj geamikoj tra Barcelono. Ni interŝanĝis multajn retleterojn por fari interkonsentojn.

Kiam mi diris al miaj geamikoj ke mi sukcesis interkonsenti senpagan ĉiĉeronadon en Barcelono, farata de iu kiu loĝas tie kaj kiun mi ne konis antaŭe, ili ne povis kredi tion. Ili antaŭe fakte ne sciis pri Esperanto kaj kiam mi unue



La internacia junulara kongreso en Zakopane

lingvo estas supera al alia. Ni estas fieraj je niaj propraj kulturo, kutimoj kaj gepatra lingvo.

Gereprezentantoj de diversaj landoj prezentis iliajn lingvo(j)n, muzikon kaj naciajn vizitindaĵojn dum la kultura kaj lingva festivalo. Estis mirinda vidi tiun unuecon en diverseco. Ĉiu persono kiu opinias ke Esperanto estas senutila kaj favoras la hispanan, la ĉinan, la anglan aŭ iun ajn alian nacian lingvon kiel internacia, devus veni al IJK. Respektu vian propran lokan lingvon kaj lernu Esperanton – estu ni amikoj kun egalaj rajtoj.

Kiel mi menciis supre, estis la nekredibla sento de amikeco kiu mirigis min plej. Aŭdeblis homoj

dirante « Saluton ! » al vi sen distinge ĉu ili konis vin au ne. Se ne, ili haltis por demandi pri via nomo kaj deveno. Neniu estis malĝentila al mi.

Mi timis ke la junularo ne plu estus tiom interesita je Esperanto kiom ili estis en la pasinteco; ke ili preferus lerni pli « komercajn » lingvojn. Malgraŭ tio, estis multaj junaj homoj dum la kongreso inkluzive de belaj knabinoj kiu volis lerni Esperanton kiel simpla kaj amuza maniero por renkonti novajn amikojn. Tio ĉi opiniigas min ke la lingvo bone fartis dum pli ol cent jaroj kaj certe ne mortos rapide.

Michał Tubis



Tweetalige opvoeding... met Esperanto!

Renato Corsetti, de voorzitter van de Wereld Esperanto-vereniging (UEA), kwam op 9 september in het clubhuis van de Antwerpse Esperantoclub La Verda Stelo spreken over tweetalige opvoeding; meer bepaald over opvoeding in een of meerdere nationale talen, gecombineerd met het Esperanto.

Zelf heeft Renato zijn kinderen meertalig opgevoed: hij sprak er steeds Italiaans mee en zijn vrouw Engels. Als tussentaal werd het Esperanto gebruikt. Tijdens de voordracht zaten en meerdere families in de zaal die in dezelfde situatie zitten (Pools-Nederlands-Esperanto, Russisch-Nederlands-Esperanto en Catalaans-Nederlands-Esperanto). Toch blijkt in de praktijk dat in een gezin waar Esperanto tegen de kinderen wordt gesproken, de ouders meestal dezelfde taal spreken.

Hoeveel?

« Hoeveel gezinnen zijn er waarbij men Esperanto spreekt tegen de kinderen? » is een van de veelgestelde vragen. Net zoals het aantal sprekers van de taal op zich, is dat uiteraard helemaal niet eenvoudig te beantwoorden. Renato vertelde dat UEA al lang tracht om hiervan een overzicht te krijgen. Hijzelf sprak van « minstens 300, maar ongetwijfeld veel meer ».



Belangrijk is ook wat eronder verstaan wordt. Veelal gaat de kennis van de kinderen niet veel verder dan passieve kennis.

Als beide ouders dezelfde taal spreken en besluiten om Esperanto te gebruiken in de communicatie met de kinderen, dan blijkt meestal de vader Esperanto te spreken en de moeder de nationale taal. Omdat de moeder een nauwere band heeft met een kind of het op zijn minst toch vaker ziet, is in de praktijk de kennis van de moedertaal van het kind vaak beter.

Zakwoordenboekje

Het woordenboek Nederlands-Esperanto-Nederlands is nu reeds een tijdje op de markt en blijkt een groot succes. Zo hebben tientallen openbare bibliotheken het werk al aangeschaft.

Toch was er nog behoefte aan een compactere versie, een zakwoordenboekje. Auteur Petro De Smedt schrijft hierover zelf:

"Een zakwoordenboekje, op de maat van een normale zak, was gewenst. Hier is het nu! Men mag echter niet verwachten dat het evenveel informatie bevat als een volwaardig woordenboek. Voor gebruik in studie- of leesruimte blijft het (handwoorden-boek) Nederlands-Esperanto-Nederlands

(FEL - 2004) aangewezen en zelfs onmisbaar. Toch is dit boekje zeer specifiek: het bevat uitsluitend woorden gevormd met de officiële stammen van het Esperanto en sluit dus nauw aan bij het Fundament van het Esperanto."

Het zakwoordenboekje is verkrijgbaar in het Esperanto-centrum in Antwerpen tegen 3 euro. De "volledige versie" is uiteraard ook nog verkrijgbaar tegen 18 euro (zachte koft) of 32 euro (stevige harde koft).

De boeken kunnen ook per post worden geleverd en besteld via de online winkel:

www.retbutiko.net

waar ook nog meer info over de werken te lezen valt.

Paul Peeraerts



NEJ administratie

We verwelkomen het lid

Ruud Bemelmans
rbemel@gmail.com

Verhuisd zijn

Sander Koning
Nigeriastraat 137
2622 GC Delft
06-18097226
skoning@ch.its.tudelft.nl

Ralph Niels
Walstro 32
5432 DR Cuijk
noviomagam@gmail.com

Ewout Lamé
Hoge der A 24-3
9712 AD Groningen
e.b.lame@student.rug.nl

Let dus op dat onze secretaris
naar Groningen is verhuisd. Hij is
telefonisch per NEJ-telefoon

Nova ludo : ENIGMO

Ni havas la plezuron proponi al vi la ludon ENIGMO, esperante ke ĝi distros vin. Por elŝuti la ludon vizitu la TTT-ejon de La Vortaro : <http://www.la-vortaro.net>

Klaku sur la vorto *Enigmo* kiun vi trovos en la rubriko 'Aliaj programoj' de la Menuo de tiu paĝo. Vi tiam povos vidi bildon de la programo kaj legi pliajn informojn. Bonan amuziĝon !

Raportis: Bernard VIVIER <bvivier@la-vortaro.net>

Por la plej junaj legantoj

Aperas la unua numero de la infana revuo *La Luno Rakontas* ĉe <http://ateliero.net/la-luno-rakontas/>

(06-42507502) te bereiken.

Donateur Alain Fagot heeft het volgende postadres en zegt per 1-1-2006 op in verband met werk buiten zijn eigen land:

Alain Fagot
8 rue Montorge
38000 Grenoble
Frankrijk
afagot@esperanto.org

Tenslotte, Ralph Schmeits heeft het e-mailadres
novavivo@hotmail.com.

Ik wens jullie een fijne herfst en misschien tot ziens bij de PSKK in Zutendaal.

Fabien van Mook

Tweetalige opvoeding... met Esperanto!

Schadelijk?

« Is het niet schadelijk voor het kind om meerdere talen te spreken van jongsaf? » Onder taalkundigen bestaat er tegenwoordig consensus over het feit dat meertaligheid niet nadelig is voor het kind, integendeel.

Van de 19de eeuw tot 1950 was men daar inderdaad niet zo zeker van. De tijdsgeest was toen heel sterk gericht op eentaligheid: Fransen moesten Frans leren en Duitsers Duits. Eigenlijk blijkt dat

de meeste mensen wereldwijd meertalig worden opgevoed: in Catalonië, Baskenland, vele Afrikaanse landen, Rusland,.... Vaak spreken kinderen drie à vier verschillende talen of dialecten zonder problemen.


Nieuwe ontdekkingen

Renato vertelde over nieuwe ontdekkingen omtrent meertalige opvoeding. Uit wetenschappelijk onderzoek blijkt dat kinderen die meertalig worden opgevoegd, niet alleen meer interesse hebben voor andere talen en op deze vakken beter scoren, maar ook in wiskunde sterker zijn.

Dit zou te verklaren kunnen zijn doordat meertalige kinderen logischer moeten denken ; ze moeten steeds concepten die ze bedenken vertalen naar meerdere talen. Ze begrijpen beter dat taal een etiket is dat de mens zelf heeft gemaakt.

Conclusie : ik zal mijn kinderen dus ook maar tweetalig opvoeden. Het is een enorme rijkdom die je hen schenkt.

Yves



La "Virtuala Ekspozicio pri Esperantaj bildkartoj" denove kreskis je 150 novaj kartoj, do nun ĝi nombras jam 969 kartojn!

<http://www.eventoj.hu/bildkartoj/index.htm>

Donkiĥoto parolas Esperanton

Dum la ĵus pasinta somero, de la 7a ĝis la 10a de julio, mi partoprenis por la unua fojo la **Hispanan Esperanto-Kongreson**, organizitan de la Hispana Esperanto-Federacio. Ĉeestis ĉirkaŭ 60 geesperantistoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj (el Francio, Germanio, Venezuelo, Portugalio, Brazilo kaj mi el Belgio) kaj ankaŭ pluraj junaj entuziasmaj komencantoj.

La kongreso okazis en la *Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca* de la urbo Alcalá de Henares, kiu situas pli-malpli 30 minutojn buse for de Madrido, kie mi kun kelkaj aliaj partoprenantoj tendumis.

Alcalá de Henares estas la naskiĝurbo de Miguel de Cervantes, la aŭtoro de la fama libro *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha*. Jam la tutan jaron en Hispanio okazadas eventoj por festi la 400-jariĝon de tiu libro. Tio klarigas la temon de la kongreso, kaj evidente la unuan tagon ni vizitis la naskiĝdomon de Miguel de Cervantes. Okazis tie ceremonia transdono de Esperanta traduko de tiu libro, far la ĵus forpasita Fernando de Diego.

La ĝenerala Direktoro de la *Archivos, Museos y Bibliotecas* de la aŭtonoma registraro de Madrido, Alvaro Ballarín, bele kaj favore al Esperanto parolis kiam li



Esperanto Desperado faris lastan koncerton

La lasta membro, Mark Dziwornu (origine de Ganao), aliĝis al la grupo antaŭ nur kelkaj monatoj. Li ludis ĝembon kaj aliajn perkusilojn. Sed li jam gastludis sur 5 kantojn en "Hotel Desperado".

La muziko kaj tekstoj plej ofte estis originale verkitaĵoj de la membroj mem. Fakte eĉ tri el la membroj kaj unu eksmembro verkis muzikon kaj tekstojn por la dua albumo. Sed de tempo al tempo aperis tekstoj de ekzemple Georgo Kamaĉo, Wiliam Auld, Vladimir Danilov kaj Maria Amanta Smilet.

Esperanto Desperado ĉiam ankaŭ ludis ekster la esperanta mondo. Ekzemple, vive en la dana radio, kiel festorkestro ĉe naskiĝtag-festo aŭ geedziĝofesto, en trinkejoj, kulturdomoj, karnavaloj kaj ĉe festado de 1-a de majo. La ofta strategio estis ludi tie, kie jam estas homoj.

En la esperanta mondo la grupo ludis dum KEFoj, KAFE, UKoj, IJKoj, PSI, Dana Jarkunveno, Germana Jarkunveno.

Dum la lasta turneo en Pollando la grupo ne nur ludis en freza festa koncerto dum IJK, sed ankaŭ ĉe koncertoj por preskaŭ plena ne-esperantista pola publiko aranĝita de la nordia kulturdomo en Krakovo, kaj kun mona apogo de la mondmuzika organizo en Danio.

Kiel kuriozaĵo ni povas menciigi, ke nia ĝembisto estis resendita al Kopenhago en la flughaveno de Krakovo pro mankanta pola vizo. Sed kun rapida ago ĉe la pola ambasadejo, kaj iom multekosta flugbileto, ni sukcesis flugigi lin reen al Pollando, tiel ke li alvenis al la kongresejo en Zakopane unu horon antaŭ la lasta koncerto kun esperanta publiko.

Esperanto Desperado dankas ĉiujn kiu apogis nin dum la jaroj.

Helle Eble Cleary, Amir Hadzahmetovic, Brian Laustsen, Kim J. Henriksen, Mark Dziwornu kaj Nis Bramsen

Kim Hedriksen en raporto.info



Esperanto Desperado faris lastan koncerton

Kiel anoncote dum la IJK, la koncertoj en Pollando estis la lastaj koncertoj de la muzikgrupo Esperanto Desperado.

Esperanto Desperado ludis unue oficiale dum KEF 5 en 1996 en Kopenhago kiel "Brokantaĵo". En 1997 la grupo ŝanĝis la nomon al la nuna. Tiam, la grupo konsistis el Birgitta Taurus Henriksen, Helle Eble Cleary, Amir Hadziahmetovic, Kim J. Henriksen kaj Denis Rock Tampa, kaj ludis akustike.

En 2000, la orkestro plene elektriĝis kaj eniris la grupon Brian Laustsen kaj Thomas Crawford, kaj la grupo sur-

bendigis la unuan kodiskon: "Jen venas...brokantaĵoj" ĉe la eldonejo Vinilkosmo. Denis intertempe iĝis refuĝinto en Germanio kaj Birgitta forlasis la grupon.

Dum aŭtuno 2003 kaj printempo 2004 la grupo klopodis surbendigi novan kodiskon. Sed fermo de studio far la polico, ŝtelado de akordeono, ktp, malfaciligis la laboron. Sed en junio 2004, la grupo finfine sukcesis subendigi "Hotel Desperado", kiun estis eldonata je la 20a aŭgusto 2004. Sur ĝi aŭdiĝas la drumisto Nis Bramsen, kiu estis en la grupo ek de januaro 2002.



Donkiĥoto parolas Esperanton

ricevis la tradukon el la manoj de la prezidanto de la *Fundación Esperanto*, José Antonio del Barrio. En la domo jam troviĝas tradukoj en pli ol 30 lingvoj, inter aliaj kelkaj en la malnova nederlanda.

La duan tagon dekkvino da kongresanoj deklamis plurfoje partojn de poemo *Hejmo*. La portugala reĝisoro kaj iniciatinto Pedro Homero registris la voĉojn, por uzi ilin en sia filmo (ankaŭ titolita *Hejmo*). Ĝi estas sciencfikcia rakonto pri homoj kiuj forlasas la Teron en grandega kosmoŝipo por trovi alian loĝeblan planedon, kaj ili elektas Esperanton kiel komunan lingvon.

Kaj por resti super la nuboj, David Galadí, astronomo, instruis nin posttagmeze kiel Sancho Panchez legis la horon en la ĉielo.

Vespere ni buse vojaĝis ĝis ekster la urbo, por ke ĝiaj lumoj ne plu ĝenu nin, kaj ni rigardis la lunon kaj kelkajn planedojn (Venuso, Merkurio kaj Jupitero) tra grandaj teleskopoj. Poste, kiam klare videblis la steloj, ni serĉis la Polusan Stelon helpe de la Granda kaj Malgranda Ursinoj. Imaginte montrilon inter la Polusa Stelo kaj la plej brila 'gardisto' de la Malgranda Ursino, Koĉabo, kaj aplikinte formulon, ni povis legi en la ĉielo kioma horo (pli malpli) estas. Estis tute originala kaj interesa vespero.

Sabate grupeto de partoprenantoj 'solvis dubojn' (ndlr.: gramatikajn), aŭ almenaŭ klopodis tion... Se ankaŭ vi havas dubojn, venu al PSKK, kaj ni solvos ilin laŭ nia kapablo....

Ni ankaŭ spektis la hispanlingvan filmon *El coche de pedales* (La pedalaŭto), subtekstigita en Esperanto. Interesa filmo, kiu situas en la periodo de la diktatoro Franco, kaj kun Esperanto-instruisto kiel unu el la ĉefroluloj. Do ankaŭ kelkaj Esperanto-vortoj aŭdeblis.

Nokte mi kun kelkaj lokaj esperantistoj vizitis la kvartalon Chueca, la gejan kvartalon de



Madrido. Mi tute surpriziĝis pri la amaso da kolorplene vestitaj homoj (ofte viroj vestitaj kvazau virinoj) en la stratoj de tiu kvartalo. En la dancejoj ne plu estis sufiĉe da loko por moviĝi, do tute ne eblis danci. Pro tio ni iris trinki ion en pli kvieta kafejo, kie min subite trafis la laco. Post

Donkiĥoto parolas Esperanton

nokta busvojaĝo al la tendumejo kaj mallonga dormo, la sekvan tagon ni maltrafis la prezentadon de la junulaj aktivaĵoj....

Sed ni ĝustatempe alvenis por la kortuŝa omaĝo al Fernando de Diego. Li estis unu el la plej bonaj Esperanto-tradukistoj, ĉefe el la hispana sed ankaŭ el la angla, franca kaj galega. Lia influo ankaŭ pruviĝas en la originala beletro, en la lingvaĵo kaj stilo de almenaŭ, sed ne nur, la verkistoj de la iberaj skolo. Li ankaŭ estas la aŭtoro de la *Granda Vortaro Hispana-Esperanto* kun 50.750 kapvortoj. La konsilo por la ĉeestantoj estis: legu, legu, legu liajn verkojn. Ĝui la rezulton de liaj talento kaj peno

estas la plej granda omaĝo kaj komplimento al Fernando de Diego. Fine oni donacis al la frato de Fernando memorplaton, kaj tiu-ĉi ankaŭ alparolis la publikon, sed ĉefe hispanlingve.

Poste la kongreso estis oficiale fermita, kaj la estro de la ejo, Jose Maria Nogales, ofertis al ni trinkaĵojn kaj manĝaĵetojn. Sekvis grupa fotado kaj adiaŭo.

Fotoj de la kongreso troveblas ĉe <http://www.esperanto-es.net/congreso2005/galerioj/>.

Heidi Goes



Lingvoinstruo en Anglio

La Esperanto-Asocio de Britio (EAB) ĵus aprobis kuraĝan projekton, kies nomo estas Springboard/Saltotabulo.

Laŭleĝe, ĉiuj unuagradaj lernejoj en Anglio (ne tuta Britio) devas, antaŭ 2010, oferti al ĉiu lerneĵano la eblon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon.

Apenaŭ ekzistas en anglaj unuagradaj lernejoj instruistoj kapablaj instrui lingvojn. Ĉiuj mem iom studis fremdan lingvon (plej ofte la francan) en la gimnazio sed, plej ofte, ne tre sukcese, kaj ili ne de tiu tempo multe uzis la lingvoscion, kaj ja ne lernis kiel instrui lingvojn.

Kroma problemo estas ke ĉiu unuagrada lernejo rajtas enkonduki fremda(j)n lingvo(j)n laŭ sia prefero; tial la lerneĵanoj alvenos la gimnazion kun malsamaj lingvoscioj - en iuj kazoj, pri malsamaj lingvoj!

Do, estas nun tutlanda konfuzo kaj malkontento! Eniru, do, Esperanto, simpatie kaj helpeme! Jam unu membro de EAB, Liz Stanley, unuope kaptis tiun okazon en la graflando Gloucestershire kaj, pasintjare, faris provprogramon. La nuna intenco de EAB estas oferti al ĉiuj lernejoj, kaj al ĉiuj lokaj edukinstancoj, studprogramon kiu uzos Esperanton kiel

veturilon por enkonduki la lerneĵanojn al fremdaj lingvoj. Ili ja lernos Esperanton, sed samtempe ili lernos pri tempoj, genroj, kazoj k.c.; eble plej grave, ili lernos ke la propra, gepatra lingvo ne estas la sola ebla lingvo en la mondo ...

EAB nun provos vendi ĉi tiun koncepton al la instancoj kiel relative praktikeblan, malmultekostan, senĝenan solvon de ilia problemo, kaj plej bonan pre-paron por posta lingvolernado.

Okazos plankunsido dum la ĉiujara somerlernejo en Barlaston (aŭgusto) kiam, dum tuta tago, 11 spertaj instruistoj esperantaj diskutos kaj decidus pri la projekto - kaj pri kiu faros kion. Dum aŭgusto / septembro oni leteros al la instancoj por oferti konsilon kaj helpon. Samtempe, Angela Tellier kun helpantoj, pretigos lernmaterialon kaj, por la instruantoj, trejnadon. Oni esperas ke ne ĉiuj instancoj (ĉ. 100) interesiĝos, ĉar mankas homaj rimedoj, sed se nur 5-10 pozitive reagos tio estos tre bona komenco.

Baldaŭ EAB faros ĝeneralan anoncon pri la projekto; poste, de tempo al tempo, oni faros pliajn anoncojn pri progreso kaj eventuala sukceso.

Esperanto en Moldavio

En la bela natura rezervejo surborde de Dnestro, apud vilaĝo Saharna en Moldavio, la 1 – 14an de aŭgusto okazis vica, jam 15-a junulara ekologia tendaro "Ecotopia". Temas pri internacia evento, organizata de EYFA (Eŭropa Junulara Ekologia Movado). Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 260 personoj el 35 landoj de la mondo: preskaŭ la tuta Eŭropo, kaj ankaŭ Japanio, Turkio, Aŭstralio, Kanado kaj Usono.

En la programo

En la programo estis multegaj seminarioj: pri verdaj movadoj, pri ekoturismo, vegeterana manĝado, alternativaj teknologioj por uzado de naturaj fortoj, por reuzado de plastaj ujoj, okazis spertinterŝanĝoj de aktivuloj de politikaj natur-protektaj organizoj, de movado kontraŭ trouzado de aŭtoj, seminarioj pri tutmondiĝo, pri virinaj-viraj problemoj, pri naciaj kulturoj de Japanio, Kamĉatka, Turkio k.a.

La 9-an de aŭgusto, kiam estis datreveno de atombombado de japana urbo Nagasaki far Usono,

en la tendaro okazis memora ceremonio kun forbruligo de simbola Fenikso, kiu devis forpreni ankaŭ ĉiun malbonon de la Tero. Okazis ankaŭ internacia koncerto *Ecovision*, kie reprezentantoj de ĉiuj landoj prezentis siajn kantojn.

Lingvoj

La laborlingvoj de la okazaĵo estis la angla, rumana kaj rusa. Tamen, ankaŭ Esperanto estis instruata far Dmitrij Kokorev el Rusio, Muriel Lesieur el Francio kaj Tatjana el Ukrainio. Pri la tendaro kaj pri instruado de Esperanto tie informis la moldava televido.

Se ne multaj uzis, do almenaŭ la vorto Esperanto ofte sonis apud lignofajro, kie homoj interŝanĝis impresojn pri la tendaro. Estus bone, se sekvantjare pli multaj esperantistoj partoprenu tiun agrablan surnaturan tendaron kun ĝia gaja kaj amikema popolo.

Fonto: <http://raporto.info>



"Espero.com" en papera formo aperis

En la jaro 2000, la papera revuo El Popola Ĉinio ĉesis eldoni kaj transformiĝis en la TTT-ejon <www.espero.com.cn>. En la lastaj 5 jaroj pli kaj pli da legantoj de papera EPĈ kaj samideanoj ekvizitis la novan TTT-ejon. Ili inspiras nin per ret-mesaĝoj, kontribuas per artikoloj kaj bildoj, diskonigas la retan EPĈ al siaj amikoj...


Iuj legantoj tamen foje plendas, ke ili preferas foliumi paperan revuon. Pro tio ni pretigis novan paperan gazeton, kiu similas al la antaŭa EPĈ, tamen estas pli juna kaj pli bela.

La gazeto kun 64 paĝoj havas 12 partojn: Politiko, Ekonomio, Retorigardo, E-movado, Kulturo, Religio, Vivo de ordinaraj ĉinoj, Tradicio, Arto, Socio, E-libroj kaj El la legantoj. En 90-a UK en Vilno de Litovio, multaj samideanoj ĝoje surpriziĝis pri ĝia apero.

Ekzistas planoj aperigi ĉiujare unu paperan eldonon por disdoni dum la Univesala Kongreso.

Ĝi haveblas per la libroservo de UEA.

Redakcio de El Popola Ĉinio



Nove aperis: Gastono Lafuŝo!

Post Tinĉjo, Asteriks kaj aliaj bildstriaĵaj herooj, Gastono siavice parolas en Esperanto. La Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO) iĝas eldonisto kaj aperigas la unuan esperantan albumon de la plej fuŝulo de la historio de bildstrio.

Kiu aŭ kio estas Gastono ?

Gastono Lafuŝo estis kreita en 1957 por vigligi la paĝojn de la humura gazeto "Spirou". Li estas fama bildstria heroo (almenaŭ en Francio), iom malpli konata ol Tinĉjo, Asteriks aŭ Lucky Luke, tamen pli ol multaj aliaj.

En 19 albumoj, tiu revemulo senĉese inventas solvojn por pli-bonigi la oficejan vivon, enamiĝas, prizorgas katon kaj ridmevon, sed ĉio tio okazigas nur fuŝaĵojn, kiuj ĉagrenas liajn ĉefojn.



Guust Flater, nu ook verkrijgbaar in het Esperanto.

Esperanto-redakcio en la unua loko ĉe Pola Radio

Laŭ la statistiko pri korespondaĵoj ĉe Pola Radio en 2004 la Esperanto-redakcio okupis la unuan lokon:

- 1-a 4014 Esperanto-redakcio
- 2-a 878 Angla redakcio
- 3-a 634 Bjelorusa redakcio
- 4-a 495 Germana redakcio
- 5-a 279 Rusa redakcio
- 6-a 197 Pola redakcio
- 7-a 46 Ukraina redakcio



Entute 6543 korespondaĵoj. Retejo: www.radio.com.pl/polonia/
retadreso: esperanto.redakcio@radio.com.pl

Leopold PATEK

Uit de pers

Google wint vertaaltests

Het Amerikaanse National Institute of Science and Technology heeft onlangs een test uitgevoerd van een aantal automatische vertaalmachines. De test bestond uit het vertalen naar het Engels van honderd Chinese en Arabische artikelen afkomstig van een Frans en een Chinees persbureau. De vertaalmachine van Google deed het het beste, met voor de Arabische vertaling een score van 0,51 op een schaal van 0 tot 1 en voor de Chinese vertaling een score van 0,36. Het programma van het Information Sciences Institute van de universiteit van Zuid-Californië werd tweede, met een score van 0,47 voor Arabisch en 0,31 voor Chinees. Nederlands kent de vertaalmachine nog niet.

<http://translate.google.com/translate>



Overdonderend succes voor tweetalig onderwijs Wallonië

BRUSSEL - Het tweetalig onderwijs kent een *boom* in de Franstalige basisscholen. Waar in 1999 nog maar negen scholen lessen of een deel van de lessen

aanboden in een andere taal, zijn dat er vanaf volgend schooljaar 81.

Vooral het Nederlands kent succes, zestig van de 81 scholen opteerden ervoor, negentien anderen kozen voor het Engels en twee voor het Duits. In 2004 boden nog maar 54 scholen een taalbad, een programma waarbij de leerlingen worden 'ondergedompeld' in een vreemde taal, aan.

Het secundair onderwijs volgt dezelfde beweging, maar daar komt het iets trager op gang. In september pakken elf scholen in de Franse gemeenschap uit met een dergelijke taalcursus.

Geografisch gezien zijn het vooral Luikse scholen die de trend volgen, gevolgd door Henegouwen, Namen, Waals-Brabant, Luxemburg en Brussel. Het tweede taalonderwijs is het best vertegenwoordigd in het officiële net (*nvdr: de scholen die de overheid zelf inricht*)

Bron: Belga